

Proveksameno, 2a nivelo (atesto pri praktika lernado)

1 Skriba parto

a Gramatika antaŭtesto

1) *Accusatif (10 points)*

Ĉu mankas temp..... al vi ? Vi ĉiam legas multe da libr....., mult..... gazet..... sed ĉu vi komprenas ti....., ki..... vi legas ? Sufiĉas vojaĝi eksterland..... por kompreni ke tre utilas scipovi lingv..... . Mi venos venont.....dimanĉ..... .

2) *Prépositions (toutes sont différentes ; 8 points)*

Ĉu vi veturos via fratino Parizo ? Verŝajne vi venos trajno eviti polucion kaj kontribui konservado la medio.

.....mi, estas prefere veturiStrasburgo por mallongigi la veturadon.

3) *Verbes transitifs ou intransitifs (6 points) :*

Baldaŭ komenc la kurso. Ĝi daŭr..... unu horon kaj fin..... je la 10a. Mi proponas ĉes..... la kurson pli frue por labor..... vin en la biblioteko. Ĉu vi kontent..... pri tiu aranĝo ?

4) *Interrogatifs (10 points) :*

..... vi loĝas ? (- En Strasburgo.)

..... horo estas nun ? (- Estas la 9a.)

.....vi malfruis ? (- Ĉar la aŭtobuso malfruis.)

.....aĝa li estas ? (- 22 jaraĝa.)

.....li estas ? (- Inĝeniero.)

.....vi vidis surstrate ? (- Mian najbaron.)

.....vi parolis kun li ? (- Evidente !)

.....li estas ? (- Tre simpatia.)

.....librojn vi aĉetis ? (- Novajn.)

.....librojn vi aĉetis ? (- Romanojn.)

5) *Affixes (tous sont différents ; 10 points)*

Post diskut..... pri ilia kandidat....., ni konstatis ke unu estas tro babil....., la alia (la barb.....) estas simpatia. Mi preferas vir..... ĉar ŝi estos pli efika pro sia kapabl..... kompreni la homojn. Sed li proponas program..... tuj far..... .

Neĝas! Rigardu la neĝ.....

6) *Emploi ou non du réfléchi (6 points)*

Karlo havas unu filon, najbarino havas unu filinon. Karlo tre ŝatasfilinon. Li ofte promenas kun filo. Li kaj filo invitas najbarinon kun filino, ĉar li scias kuiri.

b Teksto**1) Atente legu la tekston**

- Kion ni faros pri Beogrado? Ĉu ni informu? Ĉu nenion?

Beogrado estas la urbo, en kiu loĝas la dua filino de Tena. En la tempo de la morto, Beogrado estas la ĉefurbo de Serbio kaj la ĉefurbo de Jugoslavio. Serbio kaj Kroatio militas. Ne estas la tempo de la mezepoko, estas la fino de la dudeka jarcento. De Kroatio ne eblas veturi ĝis Serbio. Estis detruitaj fervojaj linioj, estis forbombarditaj aŭtovojoj, fortranĉitaj telefonaj linioj. La milito konstruis inter Kroatio kaj Serbio la Ĉinan Muron de la malamo. Okazis per longaj kaj zigzagaj kialoj, ke la parto de la familio ekloĝis en Beogrado kaj iun matenon komence de la milito ni devis konstati, ke ni ja havas parencojn en la ĉefurbo de la malamikoj. Iasence, ke la malamikoj estas parencoj. Sonis iom timige plukonstrui la opinion: ke ni mem estas la malamikoj.

Spomenka Ŝtimec : *TENA*, Eldonisto : Pro Esperanto, Vieno 1996

Post la morto: temas pri la morto kaj la entombigo de Tena, la amata avino de Spomenka Ŝtimec.

2) Klarigu alimaniere la vortojn aŭ esprimojn : (5 poentoj)

Ĉu nenion?

Ĉefurbo :

Estis forbombarditaj aŭtovojoj :

La Ĉinan Muron de la malamo :

Iasence :

3) Respondu per kompletaj frazoj kaj argumentoj : (15 poentoj)

Kiam okazas la rakonto ?

Montru kion la urbo detruigis pro la milito

Kial la verkistino aludas la Ĉinan Muron ?

Ĉu kutime la malamikoj estas parencoj ?

Kial la familianoj distanciĝis « per longaj kaj zigzagaj kialoj » ?

c Verkaĵo (ĉirkaŭ 300 vortoj)

Elektu unu el la proponitaj temoj : (20 poentoj). (Metu krucon en la kvadrato de la elektita temo).

Kiamaniere vi edukas/-is/-us viajn gefilojn ?

Ĉu eblas imagi mondon sen milito ?

Kial, en la 21a jarcento, oni parolas pri « lingvo-milito » ?

d Tasko (post la gramatika elimina testo) : Aŭdota-resumota teksto

Teksto legota du sinsekvajn fojojn kun rapideco de parolado, se eble de malsamaj voĉoj, ekz. virina kaj vira, poste resumota de la trapasanto. La kandidato ne rajtas noti ion ajn dum la legado.

**Eltiraĵo el la malferma parolado de Zamenhof
dum la Unua Kongreso en Boulogne sur mer**

... En la plej malproksima antikveco, kiu jam de longe elviŝiĝis el la memoro de la homaro kaj pri kiu nenia historio konservis al ni eĉ la plej malgrandan dokumenton, la homa familio disiĝis kaj ĝiaj membroj ĉesis kompreni unu la alian. Fratoj kreitaj ĉiuj laŭ unu modelo, fratoj, kiuj havis ĉiuj egalajn ideojn, egalan Dion en siaj koroj, fratoj, kiuj devis helpi unu la alian kaj labori kune por la feliĉo kaj la gloro de sia familio, - tiuj fratoj fariĝis tute fremdaj unu al aliaj, disiĝis ŝajne por ĉiam en malamikaj grupetoj, kaj inter ili komenciĝis eterna milito. En la daŭro de multaj miljaroj, en la daŭro de la tuta tempo, kiun la homa historio memoras, tiuj fratoj nur eterne bataladis inter si, kaj ĉia interkompreniĝado inter ili estis absolute neebla. Profetoj kaj poetoj revadis pri ia tre malproksima nebula tempo, en kiu la homoj denove komencos komprenadi unu la alian kaj denove kuniĝos en unu familion; sed tio ĉi estis nur revo. Oni parolis pri tio, kiel pri ia dolĉa fantazio, sed neniu prenis ĝin serioze, neniu kredis pri ĝi.

Kaj nun la unuan fojon la revo de miljaroj komencas realiĝi. En la malgrandan urbon de la franca marbordo kunvenis homoj el la plej diversaj landoj kaj nacioj, kaj ili renkontas sin reciproke ne mute kaj surde, sed ili komprenas unu alian, ili parolas unu kun la alia kiel fratoj, kiel membroj de unu nacio.

2 Parola parto :

a Demandoj pri esperanto kaj historio de la movado

1. Kiu kreis Esperanton, kiam kaj kial ?
2. Kiam aperis Esperanto ? En kiu formo ?
3. Citu kelkajn famajn esperantistojn el la komenco de la historio de la lingvo.
4. *La Fundamento*. Pri kio temas ? Kiam ĝi aperis ?
5. Kio okazis en 1905?
6. *Ido-krizo*. Pri kio temas ?
7. Ĉu Esperanto estis proponita ĉe la Ligo de Nacioj post la unua mondmilito ?
Kun kiu rezulto ?
8. En kiu jaro estis kreita UEA ? De kiu ? Por kiu celo ?
9. En kiu jaro SAT estis kreita ? De kiu ? Por kiu celo ?
10. Citu kelkajn esperanto-centrojn, bibliotekojn, en Francio aŭ aliloke.

b Konversacio kun la ekzamenantaro pri elektita temo

Ekzemple :

- Priskribu la idealan domon, en kiu vi ŝatus loĝi.
- Vi gastigas esperantistan eksterlandanon. Kiujn vidindaĵojn el via regiono vi montras al li ?
- Parolu pri iu trinkaĵo (ĝia deveno, ĝia uzado...)

c Komento de bildo



<http://picto.qc.ca/>